FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA · H E F

Año V (N.º 51)

# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 3

MARZO 1953

RUZAFA, 7

VALENCIA

(ESPAÑA)

## Esperantistas eminentes: LEONARDO TORRES QUEVEDO

**En el pasado Diciembre se cumplió el centenario del nacimiento de un gran español, mundialmente conocido por sus portentosas realizaciones técnicas, aunque muy poco por su entusiasta adhesión al Esperanto, al que siempre propagó y defendió, tanto privada como oficialmente. Nos referimos al gran ingeniero don Leonardo Torres Quevedo, glorioso inventor y ferviente esperantista, cuya sucinta biografía vamos a reseñar, para satisfacción y orgullo de los esperantistas españoles, y para conocimiento de aquellos que tienen de los esperantistas la menguada opinión de ser unos románticos, ilusos y, generalmente, incapaces de realizaciones útiles y efectivas. Leonardo Torres Quevedo nació el 28 de Diciembre de 1852. Fué ingeniero de Caminos, Canales y Puertos. Ocupó un cargo oficial en ferrocarriles, pero llevado de su afición por la mecánica, se dedicó pronto a desarrolllar su idea de lo automático. Y así, inventó su máquina de calcular, una de las más portentosas hasta hoy ideadas. Luego, se hizo famoso por su concepción del armazón funicular para dirigibles, de donde se han deducido todos los sistemas luego en uso. Ya en su tiempo, realizó su «telekino» o «dispositivo» para dirigir máquinas a distancia. Inventó también su «Ajedrecista Automático» que, además de realizar la oportuna jugada, avisaba los errores del contrario. Ideó y realizó atrevidos teleféricos o ferrocarriles aéreos, entre los cuales el de las cataratas del Niágara, que, en aquel entonces, era de un atrevimiento inimaginable. El mundo entero está sembrado de atrevidas construcciones llevadas a cabo por el gran español y que han servido para que muchos sepan que España produce algo más que castañuelas y guitarras. Este gran inventor fué un gran esperantista. A pesar de conocer a fondo varios idiomas, era un convencido de la maravillosa idoneidad del Esperanto, y así, en la Conferencia para el tráfico aéreo, que tuvo lugar en Bruselas en 1925, en unión del ingeniero La Cierva, otra gloria nacional, propuso que el Esperanto fuese adoptado oficialmente. El genio de Torres Quevedo, sólo comparable al de Edison o Tesla, ha sido una gloria para España y para el esperantismo español, que se honra hoy cumplidamente enalteciendo su memoria y exaltando su nombre.**

**Si en el extranjero han habido esperantistas destacados y sabios eminentes como los Profesores Richet, Canuto, Reclus Carnot y Müller, en España han sentido la llamada de la lógica, en el problema idiomático, hombres como Torres Quevedo, La Cierva, Codorniu, etc. No solamente son esperantistas los románticos y soñadores, sino también hombres prácticos y geniales de la gigantesca talla de este gran sabio, cuya memoria debe ser un estímulo para nuestros fervores.**

Tan natural y tan lógico le parece a un esperantista, por modesto que sea, relacionarse con personas que viven en las más diversas y apartadas naciones del mundo, que no concibe este hecho como un motivo de reclamo y propaganda para el idioma auxiliar. Tal vez por esto, mucha gente ignora todavía nuestra existencia o considera nuestros postulados —a pesar de ser tan sencillos y tan claros— como una eterna utopía. Divulguemos, pues, a toda hora, sin jactancias pero tampoco sin timideces, la luminosa verdad del Esperanto con la tangible realidad de su presencia en periódicos y en libros, en el turismo y en la correspondencia, como provechosa utilidad o como agradable pasatiempo, pero siempre al servicio de la intercomprensión humana.

# DU INTERNACIAJ MOVADOJ

Du gravaj internaciaj movadoj ekzistas en la mondo kun similaj celoj. Ĉefaj organizaĵoj de unu el ili estas la Universala Esperanto-Asocio kaj la Universalaj Kongresoj de Esperanto; de la alia, la Internacia Unuiĝo por Tervalora Impostado kaj Libera Komerco kaj ties Internaciaj Kongresoj. La unua el tiuj movadoj estas filologia; la dua, sociologia. Ambaŭ serĉas la pacon, kvankam per malsamaj rimedoj. Unu per havigo de internacia helpa lingvo al ĉiuj; la alia per havigo al ĉiuj de laboreblecoj kaj ties rezultoj.

Du neriĉaj bonfarantoj iniciatis ambaŭ movadojn. Unu estis D-ro L. L. Zamenhof, sub la nomo «D-ro Esperanto», en la jaro 1887, per sia Unua Lernolibro de la Lingvo Internacia; la alia estis Henry George, per sia fama verko «Progreso kaj Malriĉeco» —esploro en la kaŭzon de industriaj krizoj kaj de la kresko de malriĉeco, samtempe kun la kresko de la riĉaĵoj, la saniga rimedo— en la jaro 1880.

La interna ideo de Esperantismo estas interkompreniĝo kaj frateco inter la popoloj; la idealo de Georgismo estas la perfekta libereco, kio signifas justecon kaj fratecon inter ĉiuj homoj. Esperanto ne venis por anstataŭi la ekzistantajn naciajn, lingvojn sed por esti apud ili la dua lingvo por ĉiuj. Georgismo ne venis por aboli la privatan propraĵon, sed por distingi ĝin el la komuna propraĵo, kaj tiel justigi ĝin. Tiamaniere Esperanto celas aboli malamikecon kaŭzatan de malkompreno, dum Georgismo celas aboli malriĉecon kaj militon. Ambaŭ movadoj ne estas sektemaj, sed ĝeneralaj, en la homa senco de la vorto. Ili ne estas frivolaj, sed sciencaj.

La du movadoj kompletigus sin, unu la alian kaj fariĝus vere universalaj per sia kontakto. Esperantistoj kaj Georgistoj estas homoj de studo, bonvolo kaj paco. La unuaj bezonas scii kio estas Georgismo; por vidi, ke ĝi estas la sola firma bazo por la disvastiĝo de Esperanto; la duaj bezonas lerni kaj uzi Esperanton por faciligi siajn internaciajn rilatojn kaj la universalan instruadon kaj disvastiĝon de Georgismo.

Esperanto kaj la Unika Tervalora Imposto estas jam parte uzataj kaj aplikitaj kun la plej bonaj rezultoj. Oni povas trankvile diri, ke en la nuna stato de la aferoj, esperantistoj senpense laboras por Georgismo, kaj ke Georgistoj senpense pavimas la vojon por Esperanto. La plena venko de Esperanto kaj Georgismo ne estos la panaceo por kuraci ĉiujn terajn malbonaĵojn, sed ĝi estos la firma fundamento por ke la homaro inaŭguru oran epokon de vera fratamo.

Informojn pri Georgismo oni petu de: «International Union for Land Value Taxation and Free Trade» 4 Great Smith Street, London, S. W. 1 (Anglujo).

***Samideanoj estas petataj traduki tiun ĉi artikolon kaj publikigi ĝin en nacilingvaj gazetoj, indikante kien oni povas sin turni por ricevi informojn pri Esperanto.***

**J. ANGLADA** (Barcelono)

# HISPANAJ PEJZAĜOJ

Ofte, plimulto da hispanoj revas pri turismo al belaj eksterlandaj disfamataj lokoj. Sed, tiu plimulto ne scias, ke nia duoninsulo estas terpeco speciale favorita de Dio; tial, por ke tiuj hispanoj sciu tion (almenaŭ la esperantistoj, al kiuj frate mi amas) mi verkas la sekvantajn liniojn, kiuj, se ne sufiĉe longaj, utilos almenaŭ kiel skemo.

Karuloj: Ĉu vi volas vidi la belaĵojn de la granda usona Kanono, la glaciejojn de la Alpoj, la nordajn arbarojn aŭ la svisajn lagojn? Vi povas vidi similaĵojn en nia propra lando. En la Pirineoj ekzistas tiel granda trezoro, ke almenaŭ oni devas scii pri unu el la tieaj multaj valoj: Ordeso; ĝi situas en la centra Pirineo mem; kaj, enirante ĝin tra ĝia negrimpebla enirejo, la vizitantoj restas miraj, admirante tiun senegalan verkon de la naturo.

Rigardata de sur aeroplano, la valo aperas kiel fendaĵo, mil metrojn profunda kaj pliajn mil metrojn larĝa en la supraĵo, de ekstremo al ekstremo. La flankoj, en la malsupraj duonoj, estas preskaŭ vertikalaj muroj, kie kreskas la plej belaj abioj. La supra duono, tute vertikala, aspektas kiel murego de gigantoj. En la fundo kuras sovaĝe glaciaj akvoj en daŭraj kaskadoj. Al la vizitanto, la 12-kilometra longeco de la valo ŝajnas mallonga promenado, ĉar je ĉiu paŝo aperas novaj mirindaĵoj: kaskadoj ĝis cent metrojn altaj, saltantaj fiŝoj, fruktoj kreskintaj apud sovaĝaj rozoj kaj la mondkonata alpa floro «edelwein» (leontopodio).

Por povi antaŭeniri, oni devas grimpi. Ni grimpu, do, kaj ni vidos...

Tri gigantoj, altaj je 3300 metroj, staras antaŭ ni. Oni ĝuas panoramon, kiu alproksimiĝas al la ĉielo; sed, ni iru pli supren, kaj post kelkaj horoj troviĝos, sub niaj piedoj, senfinaj arbaroj kaj ravantaj lagoj, dum en la franca flanko ŝvebas maro da nuboj, kies finon oni ne atingas. Tre agrable estas ĝui la sunkaresojn en la pinto; niaj pensoj flugas libere kaj la horoj tro rapide pasas. Tra la glaciejo, ni malsupreniras por viziti la groton Casteret, kie ni admiras, kvazaŭ en turisma karto, plej belajn stalaktitojn kaj stalakmitojn el glacio.

Mi adiaŭas al la monto Perdito kaj la impona fendego, promesante *veneni* miajn amikojn per la rakonto de la multaj viditaj ĉarmaĵoj.

**SALVA MOR** (Zaragozo)

# ◆ LINGVA KONKURSO: LERNU TRADUKANTE! ◆

**Jen alia tradukenda teksto, kiun ni submetas al la kapablo kaj bonvolo de niaj geamikoj.**

Tasko n.° 3. TEKSTO: «La lingvistiko sin okupas pri la fenomeno de la homa parolkapablo, en plej vasta senco. Ĉiu parola aŭ skriba lingvosistemo, per kiu homoj interkompreniĝas, estas objekto de ĝia esploro. Tial, ĝi interesiĝas pri lingvoj mortintaj, same kiel pri la vivantaj lingvoj; ĝi okupiĝas ne unr pri la lingvo de plenkreskuloj, sed ankaŭ pri la vortoj aŭ frazoj de dujaraj etuloj; kaj ĝi ekzamenas ne nur kiel la indiĝenoj uzas sian idiomon, sed ankaŭ kiel fremduloj manipulas tiun saman lingvon». *Vortoj de D-ro W. Manders, en la enkonduko de lia verko «Interlingvistiko kaj Esperantologio».*

Laŭ la jam konataj reguloj, sendu la tradukon, ne pli malfrue ol la 1.ª de Majo, al la adreso de

**S-ro RICARDO QUILES, San Vicente, núm. 164 - VALENCIA**

---

*Nia lingva konkurso, dediĉita al la perfektiĝemaj esperantistoj, trovis bonan akcepton ĉe la legantoj, ĉar ni ricevis 24 tradukojn pri la tasko n.° 1. Ĝenerale, ili ĉiuj estis bone tradukitaj, kio pruvas la lingvan kapablecon de la konkursintoj. Pro tiu motivo, ne estis eble elekti la plej bonan konkursaĵon. Tial, ni decidis lotumi la premion inter la plej bonaj konkursantoj, kiuj estas jenaj:*

A. G. P. - S. A. - J. I. V. - F. R. - J. A. G. - J. M. F. - V. J. - G. C. - J. J. J. - M. A. P. S. - M. J. - M. G. S. - J. T. G. - V. O. - J. A. M. - R. M. - R. A.

*La loto falis sur la samideanon Félix Ruiz, el Sagunto, kiu ricevis jam per rekomendita poŝto la libron* ESPERANTO SESDEKJARA. *Por propra kontrolo de ĉiuj konkursintoj, jen ĉi-sube la hispana traduko de la koncerna fragmento:*

**«¿Existen verdaderamente los duendecillos? Sí, todavía existen allí, en las regiones ideales de los puros pensamientos, donde únicamente la poesía reina. Yo sé que a muchos les cosquillea una viva curiosidad por conocer la persona que se oculta detrás de la estopa de mi barba. Pero, ¿a qué pues esa tendencia en descorrer la cortina de la fantasía para descubrir una realidad trivial que, con excesiva frecuencia, en la vida real ya molesta bastante? Si no por otros claros motivos, en verdad, son dignos de envidia los niños, porque sólo ellos son capaces de ver, como existentes, los pasajes que, en maravillosos libros, ha deslizado la imaginación de los artistas. Así, pues, durante breve espacio, también tú debes ser niño inocente; guarda muy celoso el tesoro precioso de tu ingenuidad, y déjate llevar efímeramente al país del sueño y el ensueño. No te castigues con el castigo de la desilusión que, seguramente, ha de apresarte cuando, destruyendo la mágica niebla que constituye mi ser, me encuentres en la forma de un hombre vulgar con un vulgar nombre»**

*Del preámbulo de una de las acostumbradas crónicas de* LA LEGEMA KOBOLDETO

---

## ☆ LA LERNEJO

La Estraro de H. E. F. konsideris, ke nia «Koresponda Lernejo» estas la plej taŭga por zorgi ĉi tiun sekcion.

Kun malmultaj meritoj, sed kun multe da bonvolo, ni akceptas la taskon. Ĉi tie ni solvos la dubojn de niaj gelernantoj, kaj ankaŭ --kiel ĝis nun-- tiujn de niaj legantoj; kompreneble, se ili havas ĝeneralan intereson. Ni ne volas komenci nian laboron, ne esprimante nian admiron por samideano Juan Bosch, kiu ĝis nun gvidis la sekcion. Nur ni aspiras ricevi tiom da simpatio kaj esti tiel oportunaj, kiel nia anstataŭata instruanto.

Nun venigu dubojn kaj malfacilaĵojn; lerni estas superiĝi; ni bezonas perfektajn esperantistojn! Senkondiĉe je via dispono:

ESPERANTAJ KURSOJ PER KORESPONDADO

**Str. Forn, núm. 19 ∴ MOYÁ (Barcelona)**

R. MOLERA, Direktoro

## INSISTIENDO...

Los trabajos, que podríamos llamar técnicos, encomendados a la comisión designada en nuestro XIII Congreso Nacional, van progresando para dejar a punto de imprimir el diccionario Español-Esperanto.

La parte económica queda bastante floja; hasta la fecha hay comprometidas unas 36.000 pesetas por unos 180 *gesamideanoj*. Poco, poquísimo, si tenemos en cuenta la importancia de la obra emprendida. Nos vemos obligados a insistir sobre el particular. Muchos no han oído nuestra llamada. Si nuestro empeño fracasa poco valdrá el movimiento esperantista español.

Aguardamos los boletines de todos los que todavía no lo han remitido a:

RAMON MOLERA

**Calle Hospital, 13 MOYÁ (Barcelona)**

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● NORUEGA.—El profesor Olav Reiersol ha publicado el trabajo: «Transiro per diferencialaj ekvacioj de probablodenso al karakteriza funkcio kaj inverse», estudio matemático en Esperanto que requiere una perfecta precisión; aparece con resumen en inglés.

● SUECIA. — El diario «Aftontidningen», en colaboración con la entidad «Svenska Arbejder Esperanto-Forbundet» (Bamhusgatan, 8, Stockholm), organiza para el otoño próximo una «Exposición Internacional de Dibujos Infantiles», bajo el lema «Trabajo y fiesta en mi región». Este intercambio escolar, que el Esperanto favorece al relacionar participantes de muy diversos países, es una clara muestra del gran servicio que el idioma auxiliar presta en el campo pedagógico. La «Escuela Experimental de Horticultura», de Alnar, ha decidido publicar resúmenes en Esperanto de sus informes sobre experimentos en frutas y legumbres; estos informes se difunden por todo el mundo.

● ALEMANIA.—En el Club Esperantista, de Hamburgo, el señor H. Müller presentó una sesión de vistas diapositivas, tomadas durante su viaje por España. Esta «faceta» nos trae también la noticia de la próxima llegada de una caravana de esperantistas alemanes, que recorrerán diferentes ciudades españolas, durante varios días.

● SUIZA.—La conocida revista «Die Reise» (Muhlerbachstrasse, 47 - Zurich 8) publica frecuentemente noticias sobre el Esperanto. También el periódico católico «Schildwache» (Verlag Dr. C. Weder - Rorschach) publicó en sus números del 8 y 15 de Noviembre pasado, un extenso artículo «Warum eine Einheitssprache», informando sobre el desarrollo del Esperanto, y su utilidad para relacionarse con los medios católicos.

● AUSTRIA.—«Die Osterreichische Furche», de Viena, en uno de sus números, hace mención de los «Ejercicios Espirituales» de San Ignacio de Loyola, por la traducción de don Eusebio Maynar, de Zaragoza, que enriquece la literatura católica esperantista.

● ITALIA.—Se extienden los cursos de Esperanto por todo el país y entre ellos descuellan: En Milán, el Ayuntamiento subvenciona un curso, que se explica en la «Escuela de Idiomas» (Vía F. Casati), y otros cinco tienen lugar en la Escuela Técnica» (Vía Metzi d'Eril); en Bologna se ha constituído un Lectorato de Esperanto en la Universidad.

● FRANCIA.—En la Escuela Normal de Moulins (Massif Central) se ha iniciado un curso de Esperanto para maestros, al que asisten treinta y cinco estudiantes del Magisterio. También en la Universidad Laboral se mantiene un curso del idioma auxiliar.

«Bulletin Philatelique du Midi» (19, Rue Beudin - Montpellier) ha comenzado la publicación de una página internacional en Esperanto, para facilitar el intercambio.

● HOLANDA.—En Kerkrade, donde en 1951 se celebró el «Concurso Internacional de Música», se celebrará en 1954 la «Olimpiada Musical». Pueden solicitarse detalles en Esperanto al «Organiza Komitato Muzikolimpiado», Gemeentelmis, Kerkrade (Nederlando).

Los esperantistas holandeses están muy agradecidos a las pruebas de afecto recibidas, con motivo de las recientes inundaciones que tanto daño han causado.

● PORTUGAL.—El importante diario de Lisboa «República» (E. da Misericordia, 116) en su número del 24 de Febrero pasado, publica una extensa y amena crónica esperantista, que ocupa la mitad de la segunda página, con profusión de datos e informaciones, así como una sección de correspondencia. Es interesante resaltar que como ejemplo lingüístico, para los profanos, reproduce una anécdota recientemente publicada en nuestro Boletín.

---

## INTERLINGVA PARALELO

### ORIGINALO

**Pero cuando el labrador valenciano, dejando la ropa de trabajar, se atavía con su capa, su sombrero alto y todo lo demás del mismo estilo, pierde la traza morisca para cobrar un cariz completamente distinto, con un aire señorial que corresponde al que cabría llamar siglo de la seda**

De la monografía «El Traje Valenciano» del publicista Francisco Almela y Vives

### TRADUKO

Sed, kiam la valencia plugisto, lasante la laborveston, garnas sin per sia mantelo, sia alta ĉapelo kaj ĉio cetera el la sama stilo, li perdas la maŭran trajton por akiri aspekton tute malsaman, kun ia sinjora maniero, kiu respondas al tiu, kiun oni povus nomi jarcento de la silko.

El la monografio «La Valencia Kostumo» de la publicisto Francisko Almela i Vives

# HISPANA KRONIKO

**ZARAGOZO.**—La 15an de Februaro okazis la ĉiujara ĝenerala kunveno de la Societo «Frateco». La kunveno estis sukcesplena ĉiuaspekte: unue, pro la komforta ejo, ĝentile enmetita je dispono de la esperantista okazintaĵo, fare de la urba «Cámara de Comercio»; due, pro la multenombra ĉeestantaro; kaj trie, pro la bona raporto farita de la Prezidanto, S-ro Orós, kiu precipe rimarkis la progreson de nia lastjara movado en la Societo, nome: organizitaj ekskursoj, blindula kurso, vojaĝo al Svedio kaj al Brazilio de tri viglaj membroj, kiuj partoprenis en la Brazila Kongreso kaj en tiu de S. A. T. aranĝo de brila ekspozicio, omaĝe al la Majstro, la vigleco de la studenta kurso, gvidata de S-ro Marco kun efika sukceso, kaj la daŭra vizitado de eksterlandanoj. Por okupi postenojn en la Estraro, estis elektataj, kiel novaj komitatanoj, S-roj Berges kaj Buesa, kiuj estas frukto de la nova epoko.

El la parto pri petoj kaj demandoj, oni devas konstati ke estis sufiĉe varma la atmosfero provokita de la viglaj novuloj, kiuj deziras plej grandan aktivecon por niaj venontaj agadoj. Demandata la ĉeestantaro, ĉu oni estas pretaj por aranĝi en Zaragozo la 15an Hispanan Kongreson, ĉiuj --kiel unu homo-- akceptis entuziasme.

Ĉe la fino, plezure nin distris la Prezidanto per interesa kaj agrabla prelego pri la temo: «Baska Lingvistiko», premiita per longa kaj varma aplaŭdado.

## XXIV INTERNACIA KONGRESO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

Kiel jam sciigite (vidu en novembra numero, paĝo 425; kaj februara, paĝo 454), ĉi tiu grava Kongreso okazos en Lourdes (Francio) de la 12a ĝis la 16a de Aŭgusto 1953. «Katolika Esperantista Hispana Asocio» projektas kolektivan vojaĝon al tiu Kongreso. Ĉiu, kiu deziras partopreni povas peti detalojn al tiu Asocio; adreso: Plaza de Santo Domingo, 15, ZARAGOZA. La kotizojn oni povas pagi per pesetoj al S-ro Angel Llobet, Plaza de los Mártires — MANRESA (Barcelono)

*Nia bona amiko kaj fervora samideano Francisko Llorens, post rapida malsano, mortis en Catarroja, urbeto apud Valencio, la 21an de pasinta Februaro. Li estis respektinda persono, tre multe ŝatata en ĉiuj medioj, kio ebligis plej bonan reputacion al Esperanto. Ni funebras pro lia forpaso, kun sincera kondolenco al liaj gefamilianoj.*

**AN TOSTAL** Irlanda Festo de historio, sporto, arto, ktp. de la 5a ĝis la 26a de Aprilo 1953. Ni invitaŝ ĉiujn geesperantistojn ĉeesti niajn dumfestajn kunvenojn.

DUBLINA ESPERANTO - KLUBO
31, North Frederick str. DUBLIN (Irlando)

## INTERNACIA ESPERANTO MUZEO EN VIENO

La kolekto estas instalata en Hofburg, oni preparas aĉeteblan katalogon; Informilo kostas 6 r. k. samtempe subtenanta membro; Informilo estas organo de Veterana Esperanto - Klubo; en Julio 1953 estos eldonata la adreslisto de vivantaj veteranoj, esperantiĝintaj antaŭ 1914.

**Reprezentanto por Hispanio:**

**IBERIA ESPERANTO - SERVO**
Calle de Provenza, 75 ◇ Barcelono




## XIV CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO

**7 - 8 - 9 - 10 de Agosto de 1953 en BILBAO**

**Se aproxima ya el centenar de adheridos, superando así a los del pasado año por estas mismas fechas. Este alentador anticipo debe estimular a los que todavía no se han inscrito, pues el tiempo apremia y los organizadores necesitan la aportación económica de los futuros congresistas, y el apoyo moral que esto representa, para cuidar todos los detalles, a fin de que nadie quede descontento. Se espera una gran concurrencia de samideanos extranjeros que nos hará vivir memorables jornadas, en un animado ambiente internacional, de acuerdo con los interesantes actos del Congreso que publicamos en otro lugar de este mismo número, para que acaben de decidirse los vacilantes.**

*La kongreso okazos en belega urbo, kie somero estas kvazaŭ printempo. La vigla entuziasmo kaj pasia flamiĝemo de la hispana esperantistaro plene elmontriĝos dum ĝia nacia renkontiĝo. Por ĉiel helpi al la sukceso, aliĝu jam sen plia hezito! Ni atendas vin!!*

**Comité Organizador del XIV Congreso Español de Esperanto.** Ronda, 32-BILBAO

# BILBAO

*La belega urbo, kie nunjare brilos nia Kongreso, estis fondita de la kavaliro Diego López de Haro, en la ja*
*kun 250.000 enloĝantoj, kiuj vigle svarmas tra larĝaj aleoj kaj avenuoj aŭ elegantaj bulvardoj, inte*
*kaj zorge flegata, Bilbao impresas impone pro la konstanta elmontro de sia kontribuo al la tutlanda ek*
*Atestas pri tio ĝiaj grandaj ŝipkonstruejoj, arogaj altfornoj, potenca pezindustrio kaj preskaŭ la tut*
*de supereco. La haveno, kun aktiveco de 600.000 tunoj, situas je 17 kilometroj de la enfluejo d*
*De la urbo ĝis la maro, la riverbordoj estas plene kovritaj de fabrikoj kaj dokoj p*
*Bilbao estas la plej granda urbo de la Baska Lando, kaj ĉefurbo de Bizkajo, unu el la baskaj p*
*Hispanio kaj tri en Francio) estas loĝata de la baskoj, popolo el nekonata deveno, kun propra ling*
*atenton eminentaj filologoj. Amata simbolo de la lando estas la fama Arbo de Guernica (Gernika)*
*fari siajn decidojn. La baska popolo estas nobla kaj larĝanima, gastama kaj helpema laŭ tute natura n*
*trajtoj ĝiaj: granda inklino al abunda manĝo kaj bona trinko, kiel ĉiutagaj komplementoj de ĝia av*
*spektaklo, precipe en la vilaĝoj, estas la elmontro de fizika forto: levi plurfoje pezajn ŝtonblokojn, h*
*estas tiu per pilko, ĵetante kaj reĵetante ĝin kontraŭ muron, jen per mano aŭ jen per batilo aŭ per*
*ludo fariĝis universala, sed la eksterlandaj vizitantoj, okaze de la esperantista renkontiĝo, havos kaj*
*loga ero de la programo, kiun la organizantoj jam preparas kun plej skrupulaj*
*Nu, milda klimato kaj oportuna situo por facila aliro, krom la obstinaj klopodoj de la tieaj samide*
*sufiĉa garantio, ke neniel oni pentos sed agrable travivos neforgeseblajn tagojn, en hela atmosfero*
*por ebligi efektivan sukceson, rekte partoprenante en la solenoj kaj amuzoj de la 14*

# INTER LA PROZO DE LA ESPERAN

Iam estis famo, inter komercistoj, ke la bona ŝtofo jam vendiĝas en la kofro; t. e. sen bezono esti montrata... Sed, en nia epoko, kiam reklamoj bombastas pri ĉio, eĉ plej bonkvalita drapo ankaŭ nepre bezonas, ke vibrantaj diskoj de cimbaloj laŭte atentigu pri ĝi la publikon. Ne sufiĉas, ne, la propraj meritoj, se ne bruas akorde la laŭdoj. Tial, ni ne povas ne agnoski, ke ankaŭ por Esperanto oni devas tamburi, laŭ takto de cirkonstancoj, anoncante frutempe ĝiajn plej rimarkindajn solenaĵojn.

Pro tio, hodiaŭ, sub influo de la unuaj printempaj ventetoj, mi ĝojas scii, ke lastaj informoj pri nia venonta kongreso postulas al mi ŝpari banalajn vortojn, kaj iri rekte al la afero sen plia komento. Nu, bone, do, tempo estas oro, kun multe da karatoj... El dika staplo, mi elektas apartajn ekzemplerojn, sen atento al ilia geografia deveno:

LA STUDENTO, internacia studenta gazeto, plaĉe prezentita kaj bele presita, promesas altkvalitajn artikolojn por siaj proksimaj numeroj. Vere, ĝia enhavo estas varia kaj diversa, interesa por ĉiuj amikoj de la kulturo, en ĝia plej vasta senco. Espereble, la subteno petata ne mankos al ĝi. INFORMILO DE I. G. E. L. jen nova salutinda kolego, organo de grafikaj gelaboristoj. Fakte, ĝi estas duobla kolego, ĉar, krom la natura esperantista samideaneco, ĉiuj, kiuj intervenas en prilaboro de gazeto, apartenas al la grafika mondumo... La enhavo prezentas raportetojn pri la presarto en kelkaj landoj; sed speciale utila, por interesatoj, estas la Grafika Terminaro, kiu okupas tutan paĝon; mi opinias, ke ĉiuj redaktoroj legos kun atento la teknikajn difinojn pri objektoj kaj aferoj, kiuj tiel ofte tiklas, kiam oni prezentas manuskriptojn al la kompostistoj. ESPERANTA FINNLANDO, la simpatia kaj beleta kajero, estas malnova konato, kiu denove regule reaperas sub la klara devizo: «Unu vivo, unu servado!» La gazeto aspektas tre bele, kun abundo da tekstoj en finna lingvo, kiu estas tre kurioza en sia ortografio por okuloj de hispano. NORVEGA ESPERANTISTO prezentas fronte, en unu el siaj numeroj, la bonegan artikolon «Esperanto en la praktika vivo», kiun ni publikigis unu jaron antaŭe; tamen, ĝi reaperis kun etaj modifoj kaj aldonoj; tio eble signifas, ke ne temas pri rekta represo (mankas mencio pri nia Bulteno) sed insisto pri la temo, fare de la aŭtoro mem, sed... SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN, ĉiam kuraĝa avangardo, rajtas fieri pro multaj kvalitoj: zorga redakto, akurata aperado, detala informado kun lerta kaj sperta distribuo de la tekstoj sur bonega papero... Ĉu ne vere enviindaj meritoj? BULTENO de la Gepatra Sekcio estas alia amiko, kiun neniel mi forgesis. Kun laŭdinda obstino, ĝi daŭre pledas por la hejma apliko de nia lingvo, por kio ne mankas taŭgaj konsiloj kaj rimarkoj per abunda materialo, kiu estas frukto de propraj spertoj. Tute sincere mi diras, ke ĉiuj esperantistaj gepatroj devas subteni tiun bonstilan informilon por ke ĝi estu ne ja nur bulteno de landa sekcio, sed regula internacia revuo pri sia specifa tasko, kiu gardas en si

aro 1300ª. Nuntempe, ĝi estas moderna urbo
ĝardenoj kaj parkoj. Kvankam urbo tre pura
konomio per la ege valora efiko de la laboro.
emia industrio de Hispanio, en brava konkuro
rivero Nervion (Ibaizabal, en baska lingvo).
ŝarĝi kaj malŝarĝi la ŝipojn.
vincoj. La Baska Lando (kvar provincoj en
nomata EUZKERA, al kies studo dediĉis sian
kies ombro kunvenis la antikvaj baskoj por
iero, sen afekto nek emfazo. Estas karakterizaj
urema kaj vojaĝema temperamento. Tre ŝatata
i trunkojn konkure k. t. p. Sed preferata ludo
eciala korbeto, alĝustigita ĉe la brako. Tiu ĉi
os la ŝancon vidi ĝin en ĝia propra medio, kiel
rgoj, por ĉies kontentigo.
oj, por ebligi malmultekostan restadon, estas
sincera samideaneco, se oni venos al Bilbao
Hispana Kongreso de Esperanto.

# TISTA GAZETARO

ĝermojn de estonteco. SVISA ESPERO, alia karulo, en intima rilato kun estimata amiko R. Zollinger, detale raportas pri la proksima nacia kunveno de la svisaj samideanoj en Berno; kun bedaŭro mi legis pri ebla ĉesigo de la gazeto dum unu jaro, kaŭze de la eterna temo: la financoj! ORA ULEKSO, la sprita kaj gaja laŭtparolilo de la okcidentfrancaj amikoj, ankaŭ rendevuas hodiaŭ en ĉi tiu parado. Modesta ĝi estas kaj tamen vigla, per vigleco, kiun nur sano kaj juneco povas havi; kvankam jam de longe mi ne menciis ĝin, sciu ĝiaj mentoroj, ke ĉiam ĝi estas tre plaĉe legata ĉi tie. Same okazas pri ESPER-NANTA GAZETETO al kiu ne mankas seriozaj temoj, kiel ia interesa enketo pri la tikla demando *io-ujo*. LA FERVOJISTO, fidela al sia titolo, akurate salutas min ĉiumonate, mi ne forgesas, ke ĉe la lokomotivo daŭre deĵoras la bona kamarado G. Delaquaize, kiu tiom multe da simpatio lasis en Hispanio, okaze de sia lasta vojaĝo. Rigardante la desegnitajn relojn, sur la frontpaĝo, oni ŝatas fantazie veturi, fendante horizontojn, renkonte al la rondoj de homoj klarvidaj, kie Esperanto estas nun la sola legitimilo pri civitaneco...

Kaj ankaŭ tiu civitaneco estas morala varo, kiun en la universala merkato oni ne devas ŝlosi nek rigli, fidante al influo de ĝia prestiĝo, ĉar, kiel jam dirite, la aŭtentikaj produktoj devas fariĝi videblaj, por meti flanken la blufon de surogatoj, pri kiuj reklamoj ŝablone ripetas tedajn rekantaĵojn, pravigante la antaŭe diritajn asertojn de **LA LEGEMA KOBOLDETO**

# 14ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN BILBAO

## 7 - 8 - 9 - 10 AÚGUSTO 1953

## PROVIZORA PROGRAMO

UNUA TAGO - **7 Aúgusto - VENDREDO**

Je la 10ª - Disdono de la dokumentaro kaj Interkona Kunveno.
Je la 12ª - Akcepto ĉe la Urbodomo.
Je la 13ª - Aperitivo por la Kongresanoj (senpage).
Je la 18ª - Solena Malfermo de la Kongreso kaj unua laborkunsido.
Je la 23ª - Baska manpilkludo (senpage) ĉe la Sporta Klubo de Bilbao kaj vizito al ĝiaj instalaĵoj.

DUA TAGO - **8 Aúgusto - SABATO**

Je la 10ª - Dua laborkunsido.
Je la 13ª - Vizito al la urbaj muzeoj.
Je la 16ª - Promeno per trenŝipeto (senpage) tra la rivero, ĝis la marbordo (20 kilometroj) kaj vizito al la Altfornoj en Baracaldo.
Je la 23ª - Literatura Vespero.

TRIA TAGO - **9 Aúgusto - DIMANĈO**

Je la 12ª - Solena Meso, kun prediko en Esperanto, ĉe la arte admirinda Baziliko de Begoña.
Je la 13ª - Baskaj dancoj, en la placo malantaŭ la preĝejo, kaj kolektiva fotografado.
Je la 14ª - Oficiala Bankedo en restoracio sur monto Archanda.

KVARA TAGO - **10 Aúgusto - LUNDO**

Je la 9ª - Kolektiva Ekskurso, dum daŭro de la tuta tago, tra pitoreska parto de la baska marbordo, kun vizito al la fama Arbo de Guernica.
Je la 20ª - Ferma Kunsido kaj Adiaŭo.


**TUTE SENPAGE!**

**BELA ESPERANTLINGVA PROSPEKTO**

En la revuo «Valencia Atracción», monata organo de la oficejo por Turismo, ĵus aperis tre interesa esperantlingva artikolo pri la tipa Festo de la Fajro en la urbo. Tiu artikolo, cetere, estas aparte eldonita sur luksa papero kun ilustroj, kiel prospekto, kiun oni senpage liveros al ĉiu eksterlanda petanto.

Oni skribu petante ĝin al jena adreso:

**Sociedad Valenciana Fomento del Turismo**
*Bajos del Ayuntamiento* - **Valencia** (Hispanio)

Represo de ĉi tiu anonco estas afable petata

*Al polvo iom orumita, oni donas pli da laŭdo ol al oro polvohava!*
SHAKESPEARE

## TUTMONDA EKSPOZICIO DE INFANDESEGNAĴOJ

Dum aŭtuno 1953. okazos en Stokholmo tutmonda ekspozicio de infan-desegnaĵoj, sub la zorgo de Sveda Laborista Esperanto Asocio, en kunlaboro, kun la granda, ĉiutaga gazeto «Aftontidningen».

La moto de la desegnaĵoj estos: «Laboro kaj festo en mia hejmregiono».

La desegnaĵoj povas esti koloraj aŭ blank-nigraj. Sur ĉiu desegnaĵo dovas esti notita la nomo de la lando kaj la titolo de la desegnaĵo, en nacia lingvo kaj en Esperanto. Krome estu notitaj la nomo kaj la aĝo de la desegninto.

Povas partopreni infanoj en aĝo ĝis 15 jaroj. Ĉiu partoprenanto ricevos rekompencon. Post la ekspoziciado en Stokholmo, ni provos cirkuligi la desegnaĵojn tra la tuta lando

**Sveda Laborista Esperanto Asocio**
**Barnhusgatan, 8 — Stokholmo (Svedio)**

## KONFERENCO DE K. E. L. I. EN SVISLANDO

Ekde la 4ª ĝis inkluzive la 10ª de Aŭgusto, post la U. E. A. - Kongreso, KELI-anaro konferencos en Svislando; temoj, diskutoj, ekskursoj, distraĵoj, ktp. estos la programo de la Konferenco

**Informoj: S-ro FRITZ LIECHTI**
**Wallisellenstrasse, 429 — ZURICH 50 (Svisio)**

**SVEDA SOMERA SEMAJNO** en Frostavallen (Svedio) de la 9ª ĝis la 16ª de Aŭgusto 1953. La ĉefaj prelegoj temos pri UNESKO kaj pri U. E. A. kaj U. L.

**S-ro JAN STRONNE**
**Amiralsgatan, 36 — MALMO (Svedio)**

**AŬTO-PRAMŜIPO** Fredrikstad-Larvik. Por komforta transporto de pasaĝeroj kaj aŭtomobiloj de Danio al Norvegio.

**A. S. Larvik - Frederikshavn - Ferjen**
**Poŝtboks, 2.443 — OSLO (Norvegio)**

## SFINKSA ANGULETO

### MATEMATIKO EN KOKINEJO

*En stalo troviĝas kunikloj kaj kokinoj. La bestoj havas kune 35 kapojn kaj 94 krurojn. Nun jen la demando: Kiom da kunikloj kaj kiom da kokinoj estas en la stalo?*

**Oni akceptos solvojn, por la premio, ĝis 25. Aprilo.**

SOLVO DE LA **TIKLAJ KARTETOJ** EN LA PASINTA NUMERO

**KUN - IK - LO ◆ DIS - TRI**

**DEMOKRATIO**

Vizitante frenezulejon, inspektoro demandas al malsanulo, kial li troviĝas tie:

—Ĉar mi diris, ke ĉiuj miaj familianoj estas frenezaj, sed ili ankaŭ asertis la samon pri mi. Venkis, do, la plimulto...

**PSIKOLOGIO**

Sinjoro eniras en butikon por aĉeti paron da ŝtrumpoj.

La komizo, sperta psikologo, sciante pri lia deziro, demandas tre afable:

—Ĉu ili estas por via edzino, aŭ ili devas estis pli multekostaj?

**MONO-MANIO**

Avarulo n.° 1.—Kiam mi vojaĝas, mi akiras bileton por iro kaj reveno, ĉar tiel ĝi kostas pli malkare.

Avarulo n.° 2. — Tamen, en la sama cirkonstanco, ĉiam mi aĉetas bileton nur por la iro, ĉar en okazo de akcidento mi perdus la revenon...

**DIPLOMATIO**

—Ĉu vere plaĉis al vi la fino de mia romano?
—Ho, jes, tre multe!
—Kaj, kion vi opinias pri la unua ĉapitro?
—Tiun ankoraŭ mi ne legis.

**FILOZOFIO**

Kamelo povas labori ok tagojn ne trinkante, sed drinkemulo povas trinki dum la sama tempo, ne laborante.

---

Drinkemulo, al kiu foje oni proponis grapolon da vinberoj, respondis:

—Neniel mi ŝatas la vinon en piloloj.

---

**La importante revista «Valencia Atracción» de la Sociedad Valenciana Fomento de Turismo, ha publicado, en su número de Marzo, dedicado a la fiesta de las Fallas, un artículo informativo en Esperanto, con fotograbados, de nuestro redactor D. Luis Hernández, acerca del popular festejo valenciano. De este artículo se ha hecho una tirada aparte en papel «couché» para ser distribuído como prospecto. Nuestros abonados pueden solicitarlo gratuitamente, por medio de los Delegados Locales, a D. Vicente Hernández Llusera — Avda. del Ejército Español, 59 SABADELL (Barcelona)**

# LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

## ESPERANTISTO KAJ LA INTERNA IDEO

El la antipodo atingas nin, kiel eĥo, la disputo de la eŭropaj samideanoj pri la valoro de la Interna Ideo por nia movado. Kaj la areno de la kontesto de diversopinianoj fariĝis BOLETIN, la organo de la Hispana Esperanto-Federacio, S-ro Bosch ekkrias: For la Interna Ideo!, kaj li invitas «montri al la publiko, ke Esperanto permesas ŝpari monon, pliigi la profitojn, akceli komercan trafikon, interŝanĝi pli facile ĉiuspecajn konojn ktp.» S-ro Eŭma iras eĉ pli radikale en tia direkto, trovante, ke, en la nunaj cirkonstancoj, eĉ eldonado de pure literaturaj kaj beletristikaj revuoj estas superflua, «ĉar nur malmultaj elektitaj personoj deziras sin distri aŭ amuzi per esperantaj senenhavaj belaĵoj». Cetere mi devas emfazi, ke tian surprizantan konkludon li faras konstatante la formorton de «Literatura Mondo», kiu por tiuj, kiuj legis ĝin dum jaroj, ne povis ne esti perlo de la Esperanta spirito, kvankam --tion oni ja devas konfesi-- laŭ pure arta kaj estetika vidpunkto. Finfine, tia pensmaniero ne estas nova kaj simile opiniis jam S-ano E. Lanti, la fondinto de S. A. T. Ĉu tiuj samideanoj vere estas nur materialistoj, pozitivistoj aŭ utilistoj, kiel trovis iliaj oponantoj kaj defendantoj de la Interna Ideo, estas pridube; kaj oni povas supozi, ke ilia opinio estas diktata nur de taktikaj kaj propagandaj konsideroj.

Sed tio eble gravas malmulte, kompare kun la konstato, ke vere ekzistas nun ĝenerala observata tendenco elimini de ĉiuajn movado idealisman, kredan, mistikan kaj aliajn neraciajn elementojn. Sed, ĉu racio sola povas solvi ĉiujn problemojn? Ĉu ne estas bezonata ankaŭ pura kredo por atingi celon? Kaj, ĉu fine nia pensproceso ne estas ofte forte kolorigita kaj influata de niaj emocioj kaj deziroj? Se jam homa racio estus tiel ĉiopova, ĝi jam antaŭ longe estus elpensinta kaj realiginta pli stabilan kaj feliĉan socian ordon por la homaro, ol la eterna sidado sur barelo de dinamito. Oni estas inklinita dubi ankaŭ pri tio, ĉu konvenos oferi la Internan Ideon (ni ne timu konfesi, ke ĝi enhavas grandan kvanton da kredo, kaj eble eĉ iomete da mistiko) kaj literaturon esperante akiri per tio taktikajn avantaĝojn sur propaganda kampo. Tiuj, pere de Esperanto, promesotaj profito, monŝparo, trafiko kaj akireblaj konoj (laŭ S-ro Bosch) per si mem kaj en si mem nenian valoron havas, se ili ne donas al homo kontentigon; kaj, tiurilate, estas tre diversaj. Karakteriza estis la respondo de S-ano M. C. Butler, ke «la sola afero, kiu tenis min konstanta, estas la Interna Ideo kaj la literatura kvalito de la lingvo. Komerco havas por mi nenian intereson»... Kion fari kun tia tipo de Esperantisto? Kaj mi eĉ suspektas, ke la plimulto, de la dumvivaj Esperantistoj apartenas al tiu tipo.

Jes, homoj estas tre diversaj kaj se apartaj grupoj de ili povas esti allogitaj ne de unu, sed de diversaj aspektoj de la Esperantismo, des pli bone. La agnosko de la Interna Ideo, bezonata de la plimulto de la nuna Esperantistaro, tute ne ekskluzivas la altiron de eĉ milionoj da novaj esperantistoj, kiuj preferas aliajn, pli palpeblajn valorojn. Mi nur volas aserti, ke, en la nuna stadio de nia malriĉo kaj malforto, oni povas kredi pli al la fideleco de la adeptoj de la Interna Ideo, kiuj ĉion donas kaj nenion postulas, ol al la fideleco de tiuj, kiuj eble ne trovos tuj la al ili promesitajn profitojn. Kaj estas pli bone konservi almenaŭ fortan sed malgrandan kernon, ol riski ĝin per ĉio. Konklude, ni povas konstati, ke Zamenhof mem trovis sufiĉe larĝan bazon por nia movado. Sufiĉe larĝan, por ke en ĝi trovu lokon la serĉantoj, idealistoj kaj kredantoj.

***«Se nin, la unuajn batalantojn por E-o, oni devigos ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por E-o, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: Kun tiu E-o, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!»***

***(Parolado ĉe la 2ª Kongreso, Ĝenevo 1906)***

Kaj ankaŭ por la praktikuloj troviĝas loko: «Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon E-o, tute egale por kiuj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga». (Deklaracio de Boulogne-sur-Mer, 1905). Ni ne povas nei, ke Zamenhof, kiel vera Majstro, havis sufiĉe vastan vizion pri la amplekso de Esperantujo.

**D-ro ANDREW FRIDENBERGS**
Melbourne (Aŭstralio)

**DISPUTO NENIAM ESTAS KONVENA, SED AMIKA DISKUTO ĈIAM ESTAS OPORTUNA**

CLUB INTERNACIONAL
ALHAMBRA
Apartado 109 - GRANADA (España)
Revista mensual gratuita - Miembros en todo el mundo - Filatelia, Numismática, Correspondencia, Marcofilia, Esperanto, Legislación, etc.
Cuota anual en España: 30 pesetas.
Extranjero: 1 dólar U. S. A. o 1000 francos Ivert, sellos nuevos conmemorativos exclusivamente.
INFORMACION GRATUITA

INTERNACIA KLUBO
ALHAMBRA
Poŝtkesto, 109 - GRANADA (Hispanio)
Monata senpaga revuo - Membroj en la tuta mondo. Filatelio, Numismatiko, Korespondado, Markokolektado. Esperanto, Leĝoscienco, k. t. p.
Jara kotizo en Hispanio: 30 pesetoj.
Eksterlando: 1 usona dolaro aŭ 1000 frankoj Ivert, novaj jubileaj poŝtmarkoj ekskluzive.
SENPAGA INFORMADO

# RESPEKTINDA ASOCIO

**Sub tia titolo, S-ro W. A. Gething, Prezidanto de Brita Esperantista Asocio, verkis tre bonan artikolon por «La Rondo», la aŭstralia kolego, de kies paĝoj ni ĝin represas por niaj legantoj.**

Dum la 19ª jarcento, la celo de ĉiu ambicia homo estis akiri reputacion pri respektindeco. En ĉiu ebla maniero, per la sinteno, la vizaĝesprimo, la vestoj, la ora poŝhorloĝo kaj ĉeneto, la amelita kolumo, li penis montri al la samtempuloj, ke li estas dignoplena kaj ĉiel admirinda civitano. Eble, la homoj tro forte strebis doni tian impreson. Certe en la 20ª jarcento la pendolo svingiĝis en la kontraŭa direkto; kaj nun, kiam oni diras, ke iu homo estas «respektinda» la vorto enhavas ian malfavoran, mokan signifonuancon. Por esti demokrata, ŝajne, oni devas senzorge vesti, sin ŝajnigi plej ordinara, kaj esti nerimarkinda individuo, perdita en la amaso de egaluloj. Jen kion emas fari ankaŭ ni Esperantistoj. Anstataŭ paroli fiere pri nia lingvo kaj ĝia alta celo, ni kvazaŭ pardonpete mencias ĝin, se okazas bona oportuno. Ne volante trudi nian ideon, ni silentas pri ĝi... kaj niaj konatuloj komencas opinii, ke Esperanto mortis.

Sed jam venis la tempo por forjeti tiun ideon! Esperanto sukcesis kontraŭstari la efikon de du mondmilitoj kaj la prezenton de diversaj rivalaj lingvoj, inkluzive de la subvenciita «Basic English», kaj nun restas nenia dubo, ke nia lingvo, kaj nur nia lingvo, provizas la plej taŭgan solvon de vere grava nuntempa problemo. La mondo komencas akcepti tiun fakton; kaj, sekve, ni Esperantistoj kaj nia organizita Movado okupas multe pli gravan lokon en la kultura vivo de la mondo ol iam antaŭe. Nia Movado estas respektinda, laŭ la plej bona senco de la vorto, kaj gravaj instancoj, aŭtoritatuloj, gazetoj, sciencaj rondoj montras tion per sia sinteno rilate al Esperanto.

Ni, do, levu la kapon iomete! Ni pli firme kaj fiere parolu pri nia lingvo! Ni rekonu la fakton, ke ni donas ion valoran al la mondo! Ni tiam konstatos, ke la intelektuloj de la mondo venos al ni por peti gvidon, kaj ne plu estos necese, ke ni «ĉapo-en-mano» petu ilian subtenon.

Ni do gloru en la fakto, ke ni apartenas al respektinda Movado!

# RICEVITA LETERO

Sabadell, la 16an Februaro 1953.

S-ro Redaktoro de la Bulteno de Hispana Esperanto - Federacio. Valencia.

Estimata samideano:

Mi ricevis la BULTENON de januaro en kiu aperis mia recenzo pri KVAROPO. Mi pensis ke eble oni forstrekos ion nekonvenan aŭ aldonos ion interesan, sed mi vidis kun surprizo ke en pluraj lokoj estas enmetitaj iuj vortoj... malkonvenaj.

Mi dirus, recenze al mia recenzo, ke estas jenaj fuŝaĵoj:

—«nova hispana eldonejo *aperas mem* per admirinda verko».

Oni povus diri: sin prezentas mem, aŭ prezentas sin mem, sed «aperas mem per admirinda verko» estas sensenca.

—«*Plena* disvolviĝo de nia literaturo».

La disvolviĝo de literaturo ne estas plena, sed konstanta aŭ daŭra.

—«pli varia, *pli diversa*».

Malbela, pleonasma ripeto.

—«tiel la verso estas jam *vere* kompleta».

La verso estas jam simple kompleta; nek vere nek malvere.

—«*Tial, do,* tiu subteno ne manku, nepre ne manku!»

Tiu ĉi *Tial do* detruas la trudan forton de la frazo. Domaĝe!

Ĉar ĉi tiun recenzon legos la aŭtoroj kaj la eldonisto, krom la publiko, mi tre dankus se vi bonvolus noti en la proksima numero de la Bulteno kiel forigendajn la signitajn vortojn. Oni ŝarĝis ilin sur mian nomon, kaj mi ne estas la aŭtoro.

Via, **LLUIS MIMÓ.**

***Volonte ni komplezas lian deziron. — Red.***

**RUI BARBOSA (1849-1923)** Biografia eseo de Fernando Nery, El la portugala lingvo tradukis Jozefo Joels. Eldonis Domo de Rui Barbosa, Brazilio, 1949. 296 inkvartaj paĝoj, plus 10 eksterteskstaj ilustraĵoj sur arta papero. Prezo ne montrita.

Jen libro impona laŭ diversaj prestiĝoj: prestiĝo de la biografiito; prestiĝo de la fakto, ke ĝin eldonis la brazila ŝtato; prestiĝo de ĉiel eminenta traduko; prestiĝo de luksaj papero kaj ilustro... Jam de unu jaro mi posedas tiun bibliografian juvelon (kvankam kun eldonjaro 1949, fakte ĝi aperis nur fine de 1951), kiun mi unue avidege englutis kaj poste ŝate relegis.

Jen biografio de eminenta, centprocenta demokrato, laŭ la plej puraj demokratecaj tradicioj spiritaj. Estas vera plezuro informiĝi pri la agado de tiu grandanimulo, per kiu Brazilio povas fiere kunmarŝi la homaranisman amblon, kiun gvidmontras la plej noblaj homoj de la homara historio. La biografio, en si mem, estas bona, eĉ se por internacia, tutmonda legantaro, precipe ekster Latinameriko, kie oni ne konas la pretoranismon --ĉe kies lumo, cetere, la figuro de Rui Barbosa iĝas ankoraŭ pli giganta, pli eksterordinara-- por tiu legantaro, ĝi eble estas iom implika, foje labirinteta, pro nekono de la koncerna etoso kaj de la eventoj, kiuj ĝin konsistigis. Ŝajne tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la biografion destinis la aŭtoro al la brazila publiko, por kiu Rui Barbosa estas hieraŭa homo kaj la spirita atmosfero, en kiu li vivis, tute familiara. Sed, malgraŭe, tamen, eĉ tiel, ĝi rezultas kaj elstaras kun firmaj konturoj; kaj Rui Barbosa videbliĝas laŭ plej diversaj facetoj, profiltrafe reliefitaj. Fernando Nery do bone plenumis sian taskon, eĉ se origine tamen li ne verkis por internacia eksteramerika legantaro.

Multfoje, kiam mi legis la priskribon pri la nevenkebla honesteco de Rui Barbosa, pri lia amo al siaj kunhomoj, pri lia ĉiama advokateco por la leĝo kaj ne por ajna partio --kvankam li estis preskaŭ profesia politikisto!-- mi ne povis ne pensi pri Zamenhof. Jes ja; ĉar en la sfero de la honesto, de la noblo, de la plej alta homaranismo, ĉiuj vere sinceraj alstrebantoj kaj praktikantoj koincidas!

La traduko estas unuaranga. Tiel. Sen superfluaj kvalifiloj. Lastatempe nia literaturo, ĉu originala, ĉu traduka, riĉiĝadis per eminentaĵoj. Diletantismo rapide ekcedas sian lokon. Ĉu necesas memori titolojn, kiaj *Leteroj de Zamenhof, Sep fratoj, Retoriko, Ekspedicio Kon-Tiki, Kredu min, Sinjorino!, Peer Gynt, Kvaropo,* k. t. p.? *Ru Barbosa* digne apudestas. Nu, ĉar la portugala kaj la hispana estas tre parenca kaj multokaze identaj lingvoj, mi ne hezitas plej varme rekomendi la studon de ĉi tiu traduko al niaj hispanaj vortaristoj Ĝi estas riĉa minejo de trafaj redonoj po portugalaj-hispanaj vortoj kaj idiotismoj Joels --al mi ŝajnas, ke li ne naskiĝis portugallingvano!--sukcesis brile esperantigi tekston kun grandaj malfaciloj. Jen kelka eroj, dise prenitaj, kiuj montras lian virtuozon kaj kies utilon por hispanparolanto oni ne bezonas emfazi: «*ece kiel* ministro de financoj» (--en su calidad de ministro de Hacienda), «*dislaso* de la parlamento» *laŭkiel (--según,* en konjunkcia rolo), *elinter, ĵurinta juĝantaro, fortempiĝinta ŝovinismo* (--patrioterismo anacrónico), *transkurulo* (tránsfuga, desertor), *kaŭdilismo* (p. 214) ktp., ktp. Kaj elinter aliaj, jen plastika bildtrafa esprimo: «persekutate de aro da jen-jen jam atingantaj min bajonetoj».

Eĉ ne 2 % de la nuna homaro parolas portugale; malpli ankoraŭ ĉeĥe; eĉ malpli ol ĉeĥe, norvege. Ĉu ne estas do Esperanto kvazaŭ mirakligilo, kiu permesas --eĉ se ankoraŭ al malmultaj, tamen elitaj kaj *tutmondaj*-- la konon kaj ĝuon de la plej belaj spiritaj gemoj de ĉiuj gentoj kaj ilian disiron en la mondon? Kun ekzalta entuziasmo mi rekomendas ĉi tiun libron; samtempe mi plej sincere dankas la brazilajn samideanojn kaj sincere gratulas ĉi ties Ministerion de Eduko kaj Sano por tiom al si indiga faro, dediĉe al la gloro kaj ĉiea respektigo de la plej bona, plej nobla Brazilio. **J. RÉGULO PÉREZ** - Kanariaj Insuloj.

---

**RAPORTO PRI KONFERENCO DE ESPERANTISTAJ STUDENTOJ KAJ ALTLERNEJANOJ** eldonita de «Internacia Federacio de Esperantistaj Studentoj kaj Altlernejanoj» (Laksegade, 35 - KOBENHAVN K Danlando). Prezo: 5 internaciaj respondkuponoj.

Sekve de tiu Internacia Konferenco, okazinta de la 17ª ĝis la 24ª de pasinta Aŭgusto en Schluchsee (Germanio), I. F. E. S. A. eldonis ĉi tiun bone multobligitan raporton, per kies legado oni povas ekscii pri la studenta vivsituacio en kelkaj landoj. La lastaj paĝoj entenas statutojn de I. F. E. S. A., organizo starigita dum la Konferenco por akceli per Esperanto la internacian kunlaboron de studentoj kaj altlernejanoj. **E. HURTADO**




*Este es el bonito sello del Congreso.*
*Una hoja con ocho ejemplares: 50 céntimos.*

Pueden hacerse los pedidos al
**COMITÉ ORGANIZADOR,** Ronda, 32 - **Bilbao**
**Libro-Servo de la Federación,** Pelayo, 7-**Valencia**

---

# PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a MARZO 1953)

| | | |
|---|---|---|
| **Suma anterior** | 1.459 | **Ptas.** |
| E. Praaes - Valencia | 10 | » |
| E. Travé - Manresa | 10 | » |
| J. Orós - Zaragoza | 10 | » |
| M. Maynar - Zaragoza | 10 | » |
| F. García - Cádiz | 10 | » |
| J. Saladrigas - Badalona | LO | » |
| J. Estañ - Granada | 25 | » |
| A. González - Ciaño Santa Ana | 10 | » |
| Esperanto-Grupo - Sabadell | 30 | » |
| M. Garriga - Tarrasa | 10 | » |
| E. Capdevila - Barcelona | 10 | » |
| S. Roca - Barcelona | 10 | » |
| J. Vigo - Martinet | 10 | » |
| J. Domingo - Burjasot | 10 | » |
| J. Fontcuberta - Borjas Blancas | 5 | » |
| J. Régulo - La Laguna | 25 | » |
| J. Guío - Zaragoza | 10 | » |
| T. Iglesias - Santander | 10 | » |
| J. Anguita - Jaén | 5 | » |
| F. García - Hospitalet LL. | 10 | » |
| J. Fernández - Oviedo | 10 | » |
| A. Figuerola - Madrid | 10 | » |
| E. Pons - Barcelona | 12'50 | » |
| A. Pons - Barcelona | 12'50 | » |
| F. Ruiz - Valencia | 10 | » |
| F. González - Sabadell | 10 | » |
| P. Tamarit - Cheste | 5 | » |
| **Total** | 1.769 | » |

***Sigamos demostrando que la aportación da cada uno sostiene la obra de todos.***

---

Radio-Tarragona organizas ekskurson tra Francio, dum la julia monato, pere de Esperanto. Interesatoj estos informitaj, skribante rekte al la radiostacio esperantlingve. La ekskurso daŭros 12 tagojn; oni vizitos la belajn urbojn Parizo, Lyon, Toulouse kaj Nice.

---

Madridaj kunvenoj okazas nuntempe ĉe
Kafejo LISBOA
**1ª etaĝo. Ĉiusabate, je la 9ª vespere ĝis la 11ª**

---

## ANONCETOJ

**Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.**

Daphne kaj Jozefo Lencer, de ilia hejmo: 1.015, Ridgewood Ave. — Holly Hiel (Florida — U. S. A.), elkore salutas la geamikojn en Valencio kaj en la Kanariaj Insuloj, kaj en aliaj partoj de Hispanio. Leteroj kaj salutkartoj portos al ili grandan plezuron kaj emocian rememoron pri la agrablaj tagoj de ilia pasinta vojaĝo. Al ĉiuj ili respondos post ne longe

---

Kiu deziras korespondi kun la tuta mondo, skribu al S-ro Adonis G. Meana - Ciaño Santa Ana (Asturias), indikante aĝon, profesion, emojn, dezirojn. Bonvolu aldoni 2 pesetojn aŭ egalvalorajn poŝtmarkojn.

---

65 - aĝa esperantisto deziras ekinterrilati kun hispana korespondanto.
**S-ro Bolt Knight** ◆ **14, Mary street**
**DENTON (Manchester) Anglujo**

---

Komencanto, kiu deziras perfektiĝi en la uzado de la lingvo, serĉas gejunulojn por komenci korespondadon
**Wilhelm Ongsiek** ◆ **20, Finkenstrasse**
**BIELEFELD (Germanio)**

---

Hispana kukisto deziras korespondi kun gekolegoj el la tuta mondo
**S-ro Vicente Roglá**
**San Pablo, 77 — BARCELONA (Hispanio)**

---

El Italio, mi deziras interŝanĝi leterojn aŭ bildkartojn kun hispanaj gesamideanoj.
**Angelo Bez - Via Friuli, 48 — MILANO (Italio)**

---

S-ro Gosta Andersson Bondeg, 4, Strangnas (Svedio) deziras korespondi kun amatorfotografisto, por interŝanĝi bildojn kaj leterojn pri tiu temo

---

Gesellschaft für Internationale Sprache e. V. pri interlingvistika esplorado, deziras interrilati kun ĉiuj fakaj organizoj, kiuj propagandas internacian lingvon.
**Blucherstrasse, 17 - FLENSBURG-Murwik (Germanio)**

---

### RADIO - TEKNIKISTOJ!

Ĉiu, kiu deziras interkorespondadi kun hispanaj samfakuloj, skribu al teknika revuo RADIO-VISION
**Apartado 11.011 - MADRID (Hispanio)**
Oni akceptas profesiajn artikolojn por traduki kaj publikigi ilin hispanlingve

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28-VALENCIA